# BULTENO
# DE ESPERANTISTA KLUBO
# EN PRAHA • Fondita en 1902

---

LOKA GRUPO DE ĈEA n-ro 5/1987 novembro 1987

L. Křesinová

## Nia koncerto

Nia klubo de esperantistoj en Prago aranĝis la 23-an de septembro ĉi-jare solenan koncerton okaze de la Centjariĝo de Esperanto kaj 85-jariĝo de nia klubo. La koncerto estis ĉarmega kaj vere rava kaj la granda salonego de la Centra klubo de lernejoj kaj scienco de sindikatoj en Savarin estis tute plena.

La koncerton inaŭguris la prezidantino de nia klubo s-anino Helena Štruncová, kiu mallonge bonvenigis la gastojn kaj klarigis koncize, kion gravan ni solenas. La tutan pluan programon profesie prezentis artistino s-ino Libuše Erbsová, kiu per siaj vortoj preparis amikan kaj ĝojan etoson. Kantis operkantistoj de la Nacia Teatro en Prago, gesinjoroj

Dalibor kaj Soňa Janotovi
Ludmila Greinerová
Luďa Dvořáková
Karel kaj Jindřiška Zemanovi.

Per piano akompanis ilin direktanto de opero de Nacia Teatro s-ro B. Váchal.

Unue ili kantis du bibliajn kantojn esperantlingve, unu el ili esperantigis nia klubano operkantisto de Nacia Teatro s-ano Josef Vích, kiu pro subita malsano bedaŭrinde ne povis partopreni la koncerton. Plue ili kantis ariojn kaj duetojn el ĉeĥaj kaj mondaj operoj kaj operetoj, ĉeĥajn popolajn kaj artefaritajn kantojn esperantlingve kaj ĉeĥlingve.

S-ano profesore Pravoslav Sádlo-Páv ludis la duan parton de la violonĉela koncerto de Dvořák.

La eniran monologon de Ifigenio sur Taŭrido de J. W. Goethe, tradukitan de Zamenhof mem, recitis la konata drama artistino Eva Seemannová, anino de Praga klubo.

La koncerton finis denove nia prezidantino Helena Štruncova, ŝi dankis al ĉiuj geartistoj kaj transdonis al ili florojn. La koncerto sukcesis, aplaŭdo estis granda kaj ĉiuj partoprenantoj feliĉe kaj kontente disiris hejmen.

L. Křesinová

## Kiel ni kongresis

La 5-a kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio okazis en Olomouc dum tagoj de la 11-a ĝis 13-a de septembro 1987.

La alveturo de majoritato de la partogrenantoj estis vendrede en la ĉefstacidomon, kie estis la servo de post la deka ĝis dudeka horo, donanta al ĉiuj necesajn informojn. La kongreso okazis en Nacia Domo, kie ankaŭ estis la listo de ĉeestantoj. Poste ĉiu partoprenanto forveturis per tramo aŭ iris piede en sian hotelon. Ni, praganoj, estis loĝigitaj en la hotelo Flora, kie la loĝado estis moderna kaj komforta. La hotelo Flora estas konstruita ne tro malproksime de Nacia Domo, antaŭ ĝi etendiĝas Ĉeĥov-parko kaj Smetana-parko, plenaj de belegaj multjaraj arboj, en kiuj loĝadas multaj birdoj.

Vendrede je la 19-a horo ekiris de la Nacia Domo solena marŝantaro de partoprenantoj, frunte kun dancantaj knabinoj en ĉarmaj unifometoj, t.n. maĵoretkoj kaj muziko en Smetana-parkon

por meti florojn al Esperanto-monumento. La inaŭguran paroladon faris prezidanto de E-klubo Olomouc. Post la 20-a horo komenciĝis solena kultura programo. Kantis vira kanthoro Haná el Olomouc ĉeĥlingve kaj esperantlingve. La aktorino s-anino Eva Seemannová recitis Esperantan poezion, poste ludis arĉkvarteto, kiun gvidis s-ano Duda. Ĝis la 23-a horo sekvis dancvespero por junaj kaj pli aĝaj partoprenantoj.

Sabate post la 9-a horo komenciĝis laboragado de la kongreso ĝis la 11.45 horo. Tuj post la agado ĉiuj gekongresanoj foriris al la astronomia horloĝo. Ĝi estis instalita fine de la 15-a jarcento, ĝia aspekto kelkfoje ŝanĝiĝis. La lasta adapto kun garnituro proponita de la Nacia Artisto Karel Svolinský kaj farita en mozaiko, finiĝis en la jaro 1955. Antaŭ la urbodomo fotografisto fotis nin ĉiujn kaj poste sekvis tagmanĝo. Posttagmeze ĝis la 17.30 horo oni daŭrigis la labor-agadon. Post vespermanĝo, de la 19-a horo, estis inaŭgurita la societa vespero en la grandsalono de Nacia Domo kun orkestro Progres, grupo de societa danco Aerobiko. En la malgranda salono de Nacia Domo estis tutvespera Diskoteko. La amuzo finiĝis noktomeze.

Dimanĉe antaŭtagmeze estis denove la laborkunsido de la kongreso ĝis la 11.45 horo. Estis elektita nova centra komitato de ĈEA por la periodo 1987 – 1992, legitaj kaj aprobitaj rezolucioj, la nova prezidanto Inĝ. Petr Chrdle dankis por partopreno al ĉiuj niaj kaj eksterlandaj ĉeestantoj. Solene finiĝis la 5-a kongreso de ĈEA per Esperanta himno.

Estis pritraktitaj multaj gravaj aferoj, elparolitaj laŭdoj kaj kritikoj. Etoso estis solena, ĉiuj gesamideanoj bonvenis kaj adiaŭis sin kun ĝoja brilo en la okuloj. La aranĝintoj de la kongreso ĉion zorgeme kaj perfekte preparis. La vetero estis belega, dum tago brilis kaj varmigis la suno, nokte lumis la luno kaj la firmamento estis stelriĉa, sub ĝi drivis teneraj nubetoj. Domaĝe, ke ĉio bona tiel rapide finiĝas.

Ni kompletigu la rakonton de s-anino Křesinová per la listo de nova estraro de ĈEA. La prezidanto estas Inĝ. Petr Chrdle, la vicprezidantoj éstas Inĝ. Vlastimil Kočvara kaj Věra Podhradská, la sekretario estas Karel Franc, la ceteraj membroj de la estraro estas Inĝ. Margit Turková, Doc. D-ro Vlastimil Novobilský, Csc., kaj Jiří Patera. La prezidanto de la Centra kontrola kaj revizia komisiono estas D-ro Jiří Šnapka kaj vicprezidanto Ing. Jiří Hudera.

El pragaj esperantistbj en la centra komitato de ĈEA plue estas Helena Štruncová, D-rino Marie Vančurová, Jaroslav Kašparec kaj Jiří Vychodil.

Jana Cíchová

F L O R O J

Senssentante
    la Printempon,
kontemplante
    la floraron
mi konsciis
    kun certeco,
ke mi ankaŭ —
    – havas KORON!

Pura,
    blanka
kaj modesta
    la floreto – plej matura.

Eli Urbanová

Irante ĉirkaŭ bazaro

Vi ĉiuj mirus mian guston,
ĉar stranga aĵ' min ree tiras.
Rompu la manojn, faru kruĉon,
al mi la bildo multe diras!

Jen koridor'. Jen ŝi... Ŝi gardas
tenante supre la kandelon.
Tamen sen timo ŝi rigardas,
ne kaŝas al li sian belon...

Knabin' kaj viro. Sperta viro.
Kia kontrasto - barb' kaj mamo!
Turmenta estas la sopiro.
Turmenta, ho ve, estas amo...

Vi laŭte sakrus. Vi forkraĉus.
Jam perdis mi ĉe vi estimon.
Se tiu bild' al mi nur plaĉus!
Mian ekmovis ĝi animon.
(Verso kaj larmo)

Dum Kristnasko - sub lito

Laŭ belga presaĵo pasigis bruselaj policistoj Kristnaskon en iu brusela antaŭurba hotelo sub lito. Tiun tagon la ĉambristino dum matena ordofarado trovis en iu ĉambro sub lito kaŝitan pakaĵon. Policanoj ĝin malferminte trovis falsajn bankbiletojn, sume unu milionon da dolaroj. Por la detektivoj aperis eblo kapti la friponon. La pakaĵo estis reŝovita sub la liton, kaj ĉar en la ĉambro ne estis bonaj kondiĉoj sin kaŝi, la policistoj decidis atendi apud la pakaĵo. Vane. Ili neniun ĝisatendis. La posedanto de "miliono" ne aperis. El Rudé právo tradukis H.Š.

---

Programo de kunvenoj de la Klubo de esperantistoj en Praha:

<u>Novembro 1987</u>:

| | | |
|---|---|---|
| 2.11. | 70 jaroj ekde la Granda Oktobro | – Patera |
| 9.11. | Libera tribuno: anekdotoj pri instruistoj kaj lernantoj | – ĉiuj |
| 16.11. | Solena vespero okaze de la 85-jariĝo de nia klubo | |
| 23.11. | Memorvespero pri poeto František Lazecký | – Seemannová |
| 30.11. | Trarigardo de la Esperanta gazetaro | – Štruncová |

<u>Decembro 1987</u>:

| | | |
|---|---|---|
| 7.12. | Libera tribuno | ~~– Mařík~~ |
| 14.12. | Zamenhof-vespero | – Patera |
| 21.12. | Kristnaska vespero | – ĉiuj |
| 28.12. | Trarigardo de la Esperanta gazetaro | – Struncová |

<u>Januaro 1988</u>:

| | | |
|---|---|---|
| 4.1. | Humuro en la Esperanta literaturo | – Patera |

La kunvenoj de la klubo okazas ĉiulunde de la 18.30 h ĝis la 20.00 h en la agit-centro en Kodaňská strato.

---

Ĝojajn kaj feliĉajn Kristnaskajn festojn kaj pacan kaj prosperan novan jaron 1988 ni deziras al ĉiuj membroj: de nia klubo, al iliaj familianoj kaj al ĉiuj amikoj de Esperanto.

La komitato de la klubo

Por nia sano — Preparas Jindřich Ondráček

Malstreĉado per la manplatoj.

Dormante, nia korpo produktas novajn rezervojn de energio por nervoj, kiu estas utiligata la venontan tagon. Sed por iuj organoj ĝi ne sufiĉas. En la kaze de difektitaj okuloj estas grave enkonduki tian "kompletan ripozon", kiu daŭru de duonhoro ĝis unu horo aŭ eĉ pli longe, ĉiutage.

Ankaŭ dumtage eblas organizi ripozon por la okuloj tiel, ke oni la okulojn fermu kaj kovru per la manplatoj.

La procedo estas jena:

Estas necese sidiĝi komforte kiel nur ebligas la fotelo aŭ seĝo. Faru konscian malstreĉadon, sentu vin libere kaj agrable, poste fermu la okulojn kaj kovru ilin per la manplatoj tiel, ke vi ilin iomete krucigas, por ke la maldekstra manplato kovru la maldekstran okulon, la dekstra la dekstran, fleksu iom la manplatojn bovloforme, por ke la okuloj ne tuŝu ilin. Lasu sufiĉe da loko, por ke la nazo restu sentuŝa.

La kubutojn mallevu sur la genuojn, kiuj estu alpremataj kune. Kiam vi ĉi tion elprovos, vi tion farados aŭtomate. La ĉefa celo estas havi la okulojn fermitaj kaj malstreĉitaj, kiel nur eblas, kovritaj per la manplatoj. Ju pli nigran koloron vi vidas, des pli la okuloj estas malstreĉataj. Ankaŭ la pensado same ripozu kiel la okuloj, la pensojn koncentru nur sur viajn vidorganojn aŭ lasu viajn pensojn ŝvebi al agrablaj aferoj aŭ interesaj objektoj. Dek, dudek, tridek minutoj ĉiutage tre grave plibonigos vian vidkapablon. Tiu ĉi metodo estas unu el la plej avantaĝaj.

Palpebrumado.

Tio ĉi estas ekzerco aldona al la antaŭaj metodoj, kiu same helpas malstreĉadi la okulojn. Normala okulo palpebrumas en regulaj intervaloj dum la tuta tempo, dum kiu ĝi estas malfermita. Normale ni tion eĉ ne konscias. Ĉe la homoj kun difektitaj vidorganoj la okuloj fariĝas rigidaj kaj streĉitaj kaj la palpebrumado anstataŭ esti nekonscia kaj senpena procedo, estas farata konscie kaj spasme. Ĉiu homo kun difektita vidsento devus kultivi la kutimon de ofta kaj regula palpebrumado kaj tiel preventi streĉitecon de la okulo. Lernu palpebrumi 1- ĝis 2-foje dum 10 sekundoj, sen peno. Faru tion iam ajn, ĉefe dum legado. Tio estas tre simpla metodo por interrompi la streĉitecon. Fine vi spertos, ke tiamaniere vi kapablos tralegi multe pli ol normale, kaj vi tamen ne laciĝos tiom.

Sunbrilo.

La valoro de la sunbrilo estas en ĉiuj kazoj de difektita vidkapablo grava kaj oni povas nur rekomendi al ĉiuj tiaj homoj doni maksimumon da sunradioj al siaj okuloj. La plej bona maniero estas fermi la okulojn kaj turni ilin al la suno. Dume malrapide turni la kapon ambaŭflanken kaj tiel sekurigi, ke la sunradioj surfalu ĉiujn partojn en la okulo samintense. Kiam ajn tio estas ebla, faru trifoje ĉiutage po 10 minutoj.

Tiu ĉi ekzerco puŝas la sangon en la okulojn kaj estas malstreĉataj la muskoloj kaj nervoj. Dume neniam havu la okulvitrojn sur la okuloj. Tial ankaŭ limigu al minimumo la uzon de sunokulvitroj.

Rigardo al la suno.

Tiun ĉi ekzercon oni povas fari maksimume unu horon post la suneliro, kaj ne pli frue ol unu horon antaŭ la sunsubiro, tio signifas, ke somere antaŭ la 5-a horo matene kaj post la 19-a horo vespere.

El la maldekstra mano faru bovlon, kovru per ĝi, la maldekstran okulon. Per la nekovrita dekstra okulo rigardu je "unu" rekte en la sunon kaj je "du, tri, kvar" per la dekstra okulo palpebrumu. Faru 10-foje per ĉiu okulo. Post la 5-a horo matene kaj antaŭ la 19-a horo vespere tiun ĉi ekzercon ne faru! Povus difektiĝi la vidsento. Ekzercu sen okulvitroj.

(Lingva helpe de J. Mařík) (Daŭrigota)

Jen kelkaj kristnaskaj kantoj por nia kristnaska vespero en traduko de J. Kořínek

Ŝafojn paŝtis

1. Ŝafojn pastis en la val'
Betlehema paŝtistar'.
Hajdom, hajdom, tidlidom,
hajdom, hajdom, tidlidom.

2. Sendis ilin mem anĝel'
laŭ la bril' de granda stel'.
Hajdom...

3. Tie en plej povra stal'
sav' naskiĝis al homar'.
Hajdom...

Festa Kristnaska Vigili'

1. Festa Kristnaska vigili',
gaje infanoj kantu ni,
ke naskiĝis en realo
al du homoj en la stalo infanet'.

2. Naskis Maria filon ĉi,
en Betlehem okazis ĝi,
kaj vindita per tuketoj,
ekripozis en kripeto infanet'.

3. Bov' kaj azen' en apudstar'
gardis Mondestron en la stal',
varmigadis senkulpulon,
kuŝis ja sur fojn' ĉe muro infanet'

4. Li estas Di' en homa korp',
enkorpigita Dia vort',
Dia fil' kaj fil' de hom',
Mondsavont' el stala domo, infanet'.

5. Gvidis paŝtistojn hela stel',
Estron salutis de l' ĉiel',
ho bonvenu Reg' de l' mondo,
sopirita bon-dononto, infanet'.

6. Tuj Betlehemon hastu ni
kun kantsalut' al fil' de Di',
kara, eta, salutatu,
ĉiu el ni kun vi fratu, infanet'.

Dio benu!

Dio benu al ĉi domo,
kantas ni al Disinjoro,
ĉarma infaneto, Kristo Jesueto.
naskiĝinta en Betlehemo.

Irus mi al Betlehem'

Irus al Betlehem' tuj mi kun ĝoja em',
donus al eta Jesu' ĉarmajn birdetojn mi du:
"Prenu ilin jen!"
Kanuos al li kukol', ĝojos Jesua kor';
mia eta birda muzikant' dolĉe kantus per
kukola kant':
Ku-kuku! ku-kuku! sanu vi, ho Jesu'!
ku-kuku! ku-kuku! sanu vi, ho Jesu'!

Iros ni al Betlehemo

1. Iros ni al Betlehemo,
duj-daj, duj-daj, duj-daj-da!
Krist-infan', mi kun am'
lulos vin en la kripeto,
Krist-infan', mi kun am'
lulos vin en la kripet'.

2. Jaĉjo ludu sakfajfilon,
duj-daj, duj-daj, duj-daj-da!
Krist-infan', mi kun am'...

3. Jojo fajfu per la fluto:

dudli, dudli, dudli-da!
Krist-infan', mi kun am'...

4. Vi, Mateo, violonu:
hudli, hudli, hudli-da!
Krist-infan', mi kun am'...

5. Kaj vi, Vaĉjo, per la baso;
buĥi, ruĥi, buĥi-buĥ!
Krist-infan', mi kun am'...

Pro l' naskiĝ' de Krist-Sinjor'

1. Pro l' naskiĝ' de Krist-Sinjor' ni ĝojegu,
pro la Dia roza flor' gajo regu!
El virgina sino, reĝa origino,
al ni sendis lin Di'.

2. Elaĉetis sin homar', ni ĝojegu!
Per la Krista sava far', gajo regu!
El virgina...

3. Laŭ la profetaĵa vort', ni ĝojegu,
teren venis la Savont', gajo regu!
El virgina...

BULTENO do Klubo de Esperantistoj en Praha, baza organizaĵo de ĈEA, p.k. 1069, 111 21 Praha 1.
Redaktas: Kultura komisiono ĉe la komitato de la Klubo.

---

100 let esperanta 100 let esperanta 100 let esperanta 100 let esperanta

---

Vážení přátelé,

připomínáme Vám znovu několik akcí, které se uskuteční v rámci 100. výročí vzniku esperanta a 85. výročí založení pražského esperantského klubu:

16. listopadu (pondělí) v 15 hodin,

zasazení pamětní lípy v sadech Naděždy Krupské ve Vršovicích. Tento park je naproti našemu klubu v agitačním středisku na Kodaňské ulici, kde se všichni po zasazení lípy sejdeme. Předpokládáme, že příjemná zábava potrvá až do zahájení pravidelné schůze klubu v 18.30 hod.

22. listopadu (neděle) ve 13.30 hodin

bleskový šachový turnaj v esperantském klubu na Kodaňské ulici ve Vršovicích (agitační středisko). Do klubu je možno jít už v 9.00 hod. ráno.

23. - 29. listopadu (pondělí - neděle)

výstavka amatérských fotografií a amatérského kreslení v esperantském klubu ve Vejvodově ulici v Praze 1. Výstavka bude otevřena denně od 10.00 do 17.00 hodin.

7. - 13. prosince (pondělí – neděle)

výstavka výtvarné tvořivosti v esperantském klubu ve Vejvodově ulici v Praže 1. Výstavka bude Otevřena denně od 10.00 do 17.00 hodin.

Vážení přátelé,

kam máte svoje příspěvky poslat, jsme Vám už napsali v příloze našeho věstníku 6. 4/87. Všechny příspěvky budou rozděleny do kategorie dětské, do 15 let a ostatní. Ve všech kategoriích budou odbornou porotou vyhlášeni vítězové. Odměny budou spíš symbolické, ale jistě Vás potěší a rádi se našich výstavek zúčastníte.

Při návštěvě všech akcí přivedte svoje známé.

Výbor klubu

---

85 let klubu 85 let klubu 85 let klubu 85 let klubu 85 let klubu 85 let klubu

---